

# Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2010:5 (sep-okt)

**American  
Esperantist**  
★  
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2010:5 (Sep-Oct)



Fotoj de Katalin Kováts



**Ekzameniĝo (kaj post-ekzamena festado) ĉe la  
Nord-Amerika Somera Kursaro (vidu p. 6 & 14)**

## Ankaŭ ĉi-numere:

- Pri *Dothraki*
- Efike, gramatike!
- La internacia aŭto
- Juvelŝtona enigmo
- Traduki nomojn nacilingvajn
- kaj multe pli...

# Usona **Esperantisto**

**Dumonata bulteno • Bi-monthly bulletin**

**Vol 49, No 5 — 2010:5 (sep-okt)**

**Redaktisto • Editor:** Hoss FIROOZNIJA

**Sendu kontribuojn al • Send contributions to:**

✉ [bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto (American Esperantist) is the newsletter of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a closeup photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*



*Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retroŝton, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.*

*Oni rajtas reaperigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimataj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.*



**esperanto  
usa**

**Centra Oficejo • Central Office**

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ [info@esperanto-usa.org](mailto:info@esperanto-usa.org)

<http://esperanto-usa.org>

**Direktoro • Direktoro, CO:** William B. HARRIS

**Prezidanto • President:** Philip G. DORCAS

**Vicprezidanto • Vice President:** Tim WESTOVER

**Sekretario • Secretary:** Steve BREWER

**Kasisto • Treasurer:** Christopher ZERVIC

**Aliaj estraranoj • Other board members:** George

BAKER, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, ROS Haruo, Tor

KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING,

Julie WINBERG

## Free magazines!

Again this year, we're offering samples of various magazines free to members of Esperanto-USA.

We receive complimentary copies of a variety of Esperanto periodicals throughout the year, including *Juna Amiko*, *Monato*, *La Kancerkliniko*, *Heroldo de Esperanto*, *Femina*, and others.

To encourage members to subscribe to these magazines, we provide free samples to those who express an interest.

If you're a member of Esperanto-USA, you can request the free magazines by either email or postal mail. Send your email requests to

[eusa@esperanto-usa.org](mailto:eusa@esperanto-usa.org)

Or contact us by postal mail at

Esperanto-USA  
PO Box 1129  
El Cerrito CA 94530

If you're a beginner, please mention that in your message. While you cannot choose which magazines you'll receive, we'll make an effort to match beginners with material that's easier to read.

The magazines will be sent out in October, and preference will go to members who have not purchased magazines in the past. If demand exceeds supply, recipients will be selected at random.

—Bill Harris,  
Director, Central Office

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly magazine *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call: \_\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

Friend of Esperanto ..... \$10.00  
*(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)*

Youth *(you must be under 27)* ..... \$20.00

Limited Income ..... \$20.00

Individual ..... \$40.00

Family ..... \$60.00

Sustaining ..... \$80.00

Life *(birthdate required)* ..... \$800.00

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

Card verification #: \_\_\_\_\_ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

## Regional events

Here are just a few of the upcoming events for September and October. For a more comprehensive list, see <<http://www.eventoj.hu/2010.htm>>.

### September 17 – 19 (Anacortes, WA)

#### **NOREK: Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco**




The Northwest Regional Esperanto Conference isn't so much a "conference" as it is a friendly get-together.

The main event this year is

a ride on the Washington State ferry between the San Juan Islands. Other excursion possibilities are Friday Harbor and the famous Whale Museum. See <<http://sites.google.com/site/norek2010>> or contact Arlyn Kerr at <[NOREK2010@gmail.com](mailto:NOREK2010@gmail.com)>.

### October 9 – 11 (Silver Bay, NY)

#### **ARE: Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto**



Come join us on the shores of beautiful Lake George in the Adirondacks for ARE, the 17th annual Fall Esperanto Weekend!

Organized by the Esperanto-Society of Québec, the event typically draws 50–80 people from Quebec, Ontario, the northeastern US, as well as the UK, Germany, Switzerland, even Japan! Courses, talks, games, hikes in the mountains, and much more. For more info, see <<http://esperanto.qc.ca/en/are>> or contact <[informo@esperanto.qc.ca](mailto:informo@esperanto.qc.ca)>. (Below: participants on a mountain hike at ARE 2009 enjoy the view.)



## Local groups

Below are contact addresses for some of the larger local groups that meet regularly; for more complete info, see our website.

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:** <http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)

**L.A.:** <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu) <http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

### Illinois

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)  
<http://esperanto-nj.tripod.com>

### New York

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**Ohio** (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

### Texas

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle) <http://seattleesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison) <http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## Nia reprezentanto ĉe UEA

Karaj amikoj, mi nomas nian membron Lusi HARMON kiel nian reprezentanton por "komitato-A" de UEA por Esperanto-USA. Ŝi servos tri-jaran deĵoron. Dankon al Lusi pro ŝia konsento daŭri en tiu posteno.

—Filipo DORCAS  
Prezidanto, Esperanto-USA

## Ĉu traduki pri tervarmiĝo?

Esperantisto en Germanujo antaŭlonge telefonis al mi kaj demandis ĉu iu en Usono tradukis aŭ tradukas la libron *An Inconvenient Truth* de Al GORE en Esperanton. Li diris ke se ne, li forte rekomendas tian projekton. Ĉu iu en Usono iam aŭdis pri tia traduko?

—Doroteo HOLLAND  
<dorothyjeanh@gmail.com>

## Instrua interŝanĝo

Mi al kutimiĝis esti ĉe esperantista familio kontraŭ pago por lerni E-on kiam mi studvojaĝis en Eŭropo en 1976. Mi volas nun instrui Esperanton en Saratoga, CA en aŭtuno kaj resti dum unu monato ĉe familio kiu parolas Esperanton kaj povas instrui al mi pri komputiloj.

—Moloud SAGHAFIAN  
<mosagh4@yahoo.com> / 14520 Fruitvale Ave, Apt C-304, Saratoga CA, 75075

## Instruistoj: informu al E-USA!

Ni multe volas scii, kion vi faras rilate al instruado de Esperanto en Usono.

En nia Norda Teksasa Esperanto-Klubo ni havas multajn entuziasmajn komencantojn. Kelkaj estas infanoj. Ni

komencis krei kartludojn. Por diversaj partoprenantoj ni uzas ankaŭ la kursojn *Jen Nia Mondo*, *Mazi en Gondolando*, *Pasporto al la Tuta Mondo*, kaj ni komencos uzi parton de la *Urso Kurso*. Ni ankoraŭ esploras pri tio, kio funkcias pli bone. Estas bezono por diversaj paroladoj, studadoj, kaj konversacioj. Ni eĉ havas ŝercan tempon. Kaj la muziko estas ankaŭ tre grava por lerni kaj ĝui Esperanton.

Kion vi faras en viaj klub-kunvenoj kaj/aŭ konversaciaj rondoj? Informu nin, ni petas.

Kompreneble, tiuj el vi kiuj instruas formalajn klasojn multe gravas al ni ĉiuj. Bonvolu informi nin pri tio, kion vi faras. Interesas nin scii, kiujn materialojn vi uzas. Se vi mem kreas studmaterialon, pri kiaj aferoj ĝi temas? Kiuj partoprenas en la klasoj, kaj kiam, kaj kiom ofte la klasoj okazas?

Mi trovis, ke kiam mi babilis persone kun tiuj el vi kiuj instruas formalajn klasojn, vi emas resti tre humilaj pri tio, kion vi faras. La vero estas, ke vi valoras multe. Ni ĉiuj, kiuj partoprenas en la bela lingvo Esperanto, faras grandan servon al la homoj. Do, gratulon al ĉiuj vi! Al ĉiuj ni!

—Elizabetho DORCAS  
Komisiito de Edukado, Esperanto-USA  
<elizabetho@grupoj.org> / 817.446.4431

### Anoncu en Usona Esperantisto!

Anoncoj prefere estu malpli ol 150 vortojn longaj. Ni laŭbezone koncizigos. Sendu anoncojn al la adreso:

<bulteno@esperanto-usa.org>

### Vizito al SFERO kaj la CO

Raportas Filipino kaj Elizabeto DORCAS

SANFRANCISCO, KALIFORNIO — Libroj, amikoj, manĝaĵo... kia bona kolekto da ĝuo. Tiel estis nia vizito al la Centra Oficejo de Esperanto-USA la 24-an de julio. Ni “helpis” al Direktoro Vilĉo HARRIS meti novajn librojn en la ŝrankojn, elpreni librojn laŭmende, involvi ilin, meti en skatolojn, surmeti adresojn kaj poŝtmarkojn, kaj eĉ kunporti iom al la poŝtoficejo.

Okazis ankaŭ tago de Malferma Oficejo en kiu multaj vizitis, babilis kune, aĉetis librojn, kaj poste, kune tagmanĝis. Dankon al Vilĉjo HARMON, Anjo HARLOW, kaj Vilĉjo HARRIS, kiuj gastigis ilin, kaj la San-Franciska Esperanta Regiona Organizo (SFERO) pro la varma bonveno, kuko, kaj tempo kune.



### KER-ekzamenoj ĉe NASK!

SANDIEGO, KALIFORNIO — la 5-an de julio okazis unuafoje en Nordameriko ekzamenoj de la prestiĝa *Komuna Eŭropa Referenckadro* (KER) en Esperanto. Ilin gvidis instruistoj Katalin KOVÁTS kaj Duncan CHARTERS dum longa semajnfino. Ekzamenigis entute 13 kandidatoj el Usono, Meksiko kaj Kanado. Por pli da detaloj, vizitu <<http://edukado.net>>.



Katalin KOVÁTS

Orda haoso en la meznivela kurso de NASK. De maldekstre: Melissa DEMERS, Katalin KOVÁTS, Paŭleto BRENER, Harold GOODMAN, Gary ANDERSON, Aparecida ARAUJO. Foto danke al Katalin KOVÁTS. (Vidu ankaŭ p. 14.)



## *Dothraki and Esperanto: an interview with language creator David J. Peterson*

David J. Peterson, a noted language creator, has been hired to flesh out the Dothraki language from George R. R. Martin's epic fantasy series *A Song of Ice and Fire* into a full-fledged, speakable language. This constructed language, or conlang, is to be used for an upcoming HBO television series based on the novels. The title will be *A Game of Thrones*, after the first book in the series.

The show's producers hired the Language Creation Society to find an expert for this job; out of thirty-five proposed versions of Dothraki, Peterson's version was selected for the series.

David J. Peterson studied linguistics at UC Berkeley (B.A., English and linguistics) and UC San Diego (M.A., linguistics). He started creating his own constructed languages in 2000, beginning with a personal language based on Esperanto and Arabic; he has been active in the conlang community since early 2001, including volunteer work for the Language Creation Society, and he's one of the editors of *Speculative Grammarian*.

His website showcases thirteen of his conlangs (some more developed than others); his main project, Kamakawi, is influenced primarily by Hawaiian. Most of the linguistic details of his instantiation of Dothraki remain confidential until nearer the time the TV series is to be aired, but what's been released so far suggests that it's an *a priori*, fusional and synthetic language with influences from Russian, Turkish, Estonian, Inuktitut and Swahili.



**Jim HENRY**

Jim is a language creator who has been speaking Esperanto since 1996. He lives in Stockbridge, GA.

[jimhenry@pobox.com](mailto:jimhenry@pobox.com)

I interviewed David J. Peterson by email in May 2010.

### ***How did you first get interested in constructed languages?***

It was the convergence of three classes I was taking at the time: Esperanto, Arabic and Introductory Linguistics. Due in large part to the influence of Esperanto and all the natural language data I was getting in linguistics, I hit upon the idea that someone could create a language not for international communication (Esperanto, I reasoned, fit the bill for that), but just for personal use—say, between friends. As soon as the idea hit me (it was in a linguistics class), I immediately started designing the phonology for my first language: a poor project with the regularity of Esperanto and the structure of Arabic. I would later discover that I wasn't the first to have this idea.

### ***Who taught that Esperanto course at Berkeley? What was it like?***

That was actually the first time that particular Esperanto DeCAL course was taught at Berkeley, and it was co-taught by Lana Shlafer and Mina (or Stelet) Kim. I thought it was a unique experience since both Lana and Mina had been speaking Esperanto since birth (they were raised bilingual in Esperanto and their native language—Russian and Ko-

rean, respectively). It's one thing to take a course in a constructed language, and quite another to take it from two native speakers.

I still remember everything I learned. All I would need to communicate comfortably in Esperanto is more vocabulary (well, that and I'd probably avoid using any participles). When it comes to a language instruction course, I can't think of higher praise to offer – though, of course, it was also a lot of fun. I still have my USEJ sticker on my guitar case.

***What, if anything, did you already know about Esperanto before taking that course? What motivated you to take Esperanto rather than one of the other language courses offered that semester?***

My mother told me about Esperanto when I was a senior in high school (though I still can't figure out how it ever came to her attention). That was the first time I'd ever encountered the idea that a human could invent a language. It seemed pretty outlandish at the time.

Several months later, we were at a library book sale and I came across *Step by Step in Esperanto* by Montagu C. Butler. I looked that over, and took it with me to Berkeley.

As for the course, language classes at Berkeley are five units. That semester I was taking Arabic and Russian, in addition to a class for my English major and introductory linguistics. All told, that comes to 18 units—a hefty load for a freshman (average is 12; heavy is 15). I wasn't planning on taking any other classes that semester, but during the first week I saw a flier for the Esperanto DeCAL posted on the front door of my dorm. I had a good experience with the



Part of a preview from HBO's upcoming television series *Game of Thrones*, based on George R. R. Martin's books. The series will use David J. Peterson's expanded version of the Dothraki language.

previous DeCAL I'd taken (on the Doors and Jim Morrison's poetry), and figured I already knew a bit about Esperanto, so tacking on another class wouldn't be too much trouble.

***Which of your own conlangs is the best developed? Which is your favorite?***

Same answer for both questions: Kamakawi. Kamakawi was the first language I created after I realized that my previous languages suffered from serious flaws (beginners' mistakes; everyone makes them). Even so, the language wasn't perfect to begin with, but I've stuck with it over the years, and have really gotten it to a good place.

***You've mentioned before that you're natively bilingual in English and Spanish. Do you reckon that influenced your interest in languages and linguistics, or in conlanging?***

In the long run, perhaps, but initially, quite the opposite. It's very difficult to raise a child to be truly bilingual; usually one language predominates over the



other. In my case, that was English. I was doing pretty well with Spanish, but then I was moved away to Fresno, away from my mother's side of the family. There I had pretty much no regular contact with Spanish speakers any longer, and English took over. By the time I moved back, I'd lost too much time, and Spanish became a source of frustration for me. I tried to block it out, ignore it—and the thought of learning languages other than Spanish was abhorrent to me. That was a serious roadblock. I had to reclaim my fluency and tap into my native knowledge (and for that, I have not only my Spanish teachers to thank, but my grandmother. I've always understood her Spanish, and she never gave up speaking it to me).

**What can you tell me about Dothraki semantics and pragmatics?**

I tried at all times to adhere to the ideals espoused by the Dothraki in George R. R. Martin's books. There's a kind of Dothraki mindset that one gleans from the books. They're warriors, of course, but there's also a series of dualities. For example, the Dothraki are nomadic, yet they have one fixed city (Vaes Dothrak), and there's a certain code of behavior that applies to being in the city, and a different one for being elsewhere. I tried to bring these different senses of place into the language where possible.

For example, in Dothraki something done in secret is done *torga essheyi* —literally, “under a roof”. The Dothraki believe that all honorable acts are under-

taken beneath the open sky, so to do something under a roof—is to do it secretly, and in a way which doesn't merit approval.

**Is the form of the Dothraki word “ido” (wooden, fake) an inside joke vis-a-vis the Esperanto/Ido schism?**

Hee, hee... You caught me! I would like to say, though, I don't wish the Ido community ill, by any means. Think of it as kind of good-natured ribbing—the way one might tease someone from a rival school. But make no mistake: If I were choosing sides in an Esperanto-Ido athletic competition, I'd proudly wear a green star sweater.


**How would you say “ne al glavo sangon soifanta” (not to a sword thirsting for blood) in Dothraki?**

Man, what a line to choose! You're really making me work for this. I'm even going to have to dust off the seldom-used present participle... Nice not to have to coin any words, though.

*Vos arakhaan feveya qoyoon...*

Dang, 11 syllables... Of course, if this were in verse, I'm sure the *vos* could be clipped to *v'*. That'd give us 10. Anyway, I would note here that this is the translation of a line of verse, and that the phrasing, as a result, is unusual (if I had the full sentence with the verb, I think I'd do it a different way, but without the verb, this is the best way).

[Editor's note: The extended interview with supplemental info can be found at <<http://pobox.com/~jimhenry>>.] ★



## Alternatives to traditional language classes

Language teaching in the traditional sense has for the most part meant classroom instruction, either as part of a broader curriculum or as a stand-alone course. In recent decades, especially in the U.S., this approach has been in decline for a variety of reasons, including school budget problems and shifts in priorities.

One interesting exception has been an increase in the teaching of Chinese, and not just because of China's growing global importance. The Chinese government underwrites the pay of some Chinese language teachers in the U.S. and other countries, so that school systems unable to afford to teach other languages can offer Chinese at far lower cost.<sup>1</sup>

Unfortunately, Esperanto is one of the languages experiencing a decline in classroom teaching, as reflected in reports collected by the American Association of Teachers of Esperanto. (If you teach an Esperanto course, please let us know. You'll find a form on our website at <<http://aaie.us>> and in every issue of the AATE newsletter.)

This decline doesn't necessarily mean fewer people are learning Esperanto, however. Recent years have seen an explosion in Esperanto classes online, most notably via Lernu.net. As a consequence of the decline in formal teaching and the rise in online courses, the fraction of self-taught Esperanto speakers, always large in comparison with students of other languages, is now probably higher than ever. Of course, the online courses are not always entirely self-taught. There are often ways of getting help from a live volunteer tutor.



### D. Gary GRADY

Gary is Vice President of the American Association of Teachers of Esperanto (AATE). He lives in Durham, NC.

[dgary@mindspring.com](mailto:dgary@mindspring.com)

So is classroom teaching even relevant today? Certainly! For all the difficulty in organizing and offering a conventional class, it remains one of the most efficient ways to teach a language to a substantial number of people, as Andreo Cseh in particular demonstrated decades ago.

But at the same time, it's clear we need to recognize how people today actually learn Esperanto and we need to think about what we can do to make it better. That's an open-ended subject, so I'll limit myself to just a few suggestions, a few of which I've touched on before.

First, the best known and most successful classroom courses are those offered as part of the North American Summer Esperanto Institute (NASK), currently at the University of California at San Diego. These are intensive three-week classes taught at several levels. For those who can afford the time and the cost (note that financial aid is available), NASK is possibly the best way to advance one's knowledge of Esperanto in the shortest amount of time. Similar programs of varying lengths are offered in other countries and are also worth investigating.

For those of us with less free time or travel funds, weekend courses are sometimes offered by regional Esperanto or-



Chris WINGROVE

usona esperantista junularo

www.usej.org



Andy ROSENBAUM

Hej gejunuloj! Ĉu interesas vin landa grupo de junaj esperantistoj? Kelkaj junaj usonanoj nun klopodas revigligi la junularan movadon en nia lando – kaj ni volas ke ankaŭ vi partoprenu! Do se vi volas renkonti aliajn mojosajn junajn esperantistojn, kaj eble eĉ uzi tiun ĉi lingvon, bonvolu kontakti nin aŭ retroŝte (la preferata maniero) aŭ poŝte:

*Hey youngfolk! Have any interest in a national group for young Esperantists? Several of us are now working to revive the youth movement in the US of A—and we'd like you to be a part of it! So, if you want to meet other awesome young Esperantists, and maybe even use the language, please contact us either by email (preferred) or by snail mail:*

**<usejestro@gmail.com>**

**Chris Wingrove  
CPU Box 274791  
University of Rochester  
Rochester, NY 14627**

Amike, :)  
Chris kaj Andy

ganizations, and *kongresoj* and local meetings can serve as de facto immersion courses. It's amazing how much fluency improves during a week at an *Universala Kongreso*.

One way to make local meetings more effective is to dedicate a little time in each gathering explicitly to language learning. One possibility is for everyone to work through a course or textbook, such as William Auld's *Paŝoj al Plena Posedo* or Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-lando* (part of the latter can be found on Lernu.net). This is one of the things the Raleigh-Durham group did

when it first started. It's probably best not to devote the whole meeting to study, since that gets to be a bit too much like homework, but a little of it can help relative beginners catch up to the more experienced speakers, and it tends to help everybody improve their abilities rather than just maintain them.

A related idea is for everyone to read a short article or listen to a podcast in Esperanto (either during the meeting or in advance) and then talk about the subject matter, the vocabulary, and the grammar used. Among other things, this helps reduce the risk of developing a local dia-

lect of Esperanto rather than learning the international norm.

Yet another possibility is to translate a short paragraph or so of colloquial English into Esperanto, since that can spark some interesting discussions and yield creative solutions that offer insights into how to employ Esperanto's remarkable expressive capabilities. In *La Bona Lingvo* the late Claude Piron mentioned how much he learned translating prose into simple, beginner-level Esperanto, and if Claude Piron could benefit from that exercise, surely the rest of us can do so.

Incidentally, a language teaching method popular in a number of European countries is to have students spend part of each class teaching each other, and that's basically what happens when a local group devotes some meeting time to deliberate teaching.

Technology has done a lot to help isolated Esperanto speakers practice the language, for example by exchanging email internationally. There are mailing lists and discussion forums devoted specifically to learning, and these can amount to an Internet analog of a local group. You can find discussions online at Lernu.net and of course at esperanto-usa.org, and you can search in both groups.yahoo.com and groups.google.com for mailing lists devoted to "learning Esperanto" or "Esperanto-lernado" and the like. You'll be surprised by the number of possibilities out there. Often you can read recent messages before joining the group to see how active it is and at what level it operates.

The energetic Chuck Mays, another officer of AATE, is currently investigating the practicality of using free and in-

expensive online video conferencing services for purposes of virtual meetings and classes. All it takes is an inexpensive webcam (now built into many laptop computers) and a reasonably fast Internet connection.

Here in east-central North Carolina we've enjoyed meetings in which one of the participants is actually more than a thousand miles away but still present on the screen of a laptop, able to join in the conversation almost as if he were actually here.

There are also virtual worlds such as SecondLife.com that allow people to attend meetings as if together in an imaginary location, or a sort of cartoon version of a real one.

With the spread of broadband Internet, it may soon become the most common medium for Esperanto classes of the future (and not just Esperanto, for that matter). I'll have more to report on these experiments in a later column. In the meantime, try it yourselves and share what you learn.

<sup>1</sup> <http://nytimes.com/2010/01/21/education/21chinese.html> ★

## Senintenca esperantaĵo?



Montego Hills – ĉu ne memkontraŭdiro? Fotita en San Jose, Kalifornio de Gregory TSEYITIN.

Ĉi-numere ni prezentas kanton tradukitan el la hebrea fare de Ŝajo MOR en Kanado.

## Ekzistas floroj

Verkis Natan JONATAN, 1970

Elhebreigis Ŝajo MOR

Ĉu vi vidis tian belan belecon?  
Tia, kia tremis pro aŭtuna vento.  
En l' obskuron estingiĝis orkampo'  
kaj ekbruligis kandelojn de scilo.

Ĉu vi vidis tian ruĝan ruĝecon?  
tia, kia vokis al distancoj.  
Tie antaŭe estis kampo de sango,  
kiu nun iĝas kampo de papavoj.

[refreno]

Ne pluku, knabo mia!  
Ekzistas floroj forpaseblaj,  
Ekzistas floroj kiuj senfine  
daŭras en la melodio.

Ĉu vi vidis, kio nigriĝis tie?  
Ĝi estas dornkampo, mia knabo,  
forlasita de l' somer',  
kaj nun ĝi ja estas rikoltkampo.

Ĉu vi vidis, kio blankiĝis tie?  
Knabo mia, ĝi estas larmkampo.  
Ĝiaj larmoj iĝas ŝtonoj plorantaj,  
ĝiaj ŝtonoj iĝas floroj florantaj.

Pri la fono, Ŝajo klarigas:

*“La kanto estas ofte uzata en memortagoj de falintaj soldatoj, nun ankaŭ por civilaj viktimoj de terorismo. La aŭtoro perdis sian filon, kiu estis juna soldato, dum milito.*

*Kiam temas pri verkistoj, granda, vivskua tragedio ofte varbas iliajn plej altajn kreofortojn kaj rezultigas majstroverkon kiu trafe tuŝas la animojn de multaj.*

*Interalie, la kanto uzas kiel gvidmotivon la temon de endanĝerigataj sovaĝfloroj – kiuj multe ekzistas en la lando kaj estas laŭleĝe protektataj kontraŭ plukado – kaj iom komparas tiujn ĉi endanĝerigatajn florojn kun falintaj soldatoj.”*

## Korespondi deziras

Mia nomo estas Mikelo, kaj mi ŝatas ricevi korespondon de samideanoj. Ne havante familion, estus plaĉe ricevi leterojn de iu. Mia tempo en malliberejo klerigas min. Mi ne nur lernas Esperanton, sed mi daŭre edukas min, kompletigante la komercajn klasojn, plumbistajn klasojn, kaj aliajn programojn, kiuj helpas plibonigi homon. Mi scias, ke viaj leteroj helpas min pri tio. Dankon.

**Michael SETTLEMIRE #151152, ASPC Florence/South, P.O. Box 8400, Florence AZ 85132-8400**

Mi estas pola esperantistino kaj mi korespondas kun kelkaj amikoj el diversaj landoj. Bedaŭrinde mankas al mi esperantisto aŭ esperantistino el Usono. Ĉu vi povus helpi al mi? Mi loĝas en norda Pollando, proksime al Gdansk, ĉe Balta Maro. Mi estis instruistino, nun mi jam ne laboras kaj okupiĝas pri Esperanto. Amike, Jadviga <jagaw53@poczta.onet.pl>.

Finn-sveda esperantistino kun parencoj kiuj enmigris al Usono antaŭ 100 jaroj, deziras korespondi kun usona esperantisto interesata de genealogio. Mi estas emerita sociallaboristino. <s.lingman@comhem.se>

**Soile Lingman, Ringvagen 72, SE 118 61 Stockholm, Sweden**

# La internacia aŭto

de Aparecida ARAUJO

*[Jen parto de raporto verkita de brazila studentino en la ĉi-jara Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK). La raporto unue aperis en "La NASKa Fasko", ĵurnalo de la kursaro. Se vi volas legi pli, la Fasko haveblas rete ĉe <<http://esperanto.org/nask>>. —Red.]*

Bonŝance la periodo de NASK koincidis kun la 4-a de julio, kiu gravas en Usono, ĉar antaŭ 234 jaroj, en 1776, estis akceptita la Deklaro de Sendependeco.

Por kuncelebri, NASKanoj estis invititaj spekti piroteknikaĵojn en la vilaĝo *La Jolla* post la sunsubiro. Kelkaj havis aŭtojn, kaj ĝentile savis nin de la antaŭvidita, prema aŭtobusa reveno.

Survoje d-ro Katalin KOVÁTS observis la internaciecon de nia aŭto. Fenomeno kiun nur Esperanto povas okazigi. Personoj el kvar kontinentoj, el ses landoj, el ses malsamaj naciaj lingvoj, (Meksiko, Argentino, Brazilo, Hungarujo, Israelo kaj Irano), pere de Esperanto gaje parolis kaj facile komprenis unu la alian.

Estis tiom signifa okazaĵo por nia



grupo, kaj Katalin havis la ideon foti, kaj ankaŭ mi kaptis la okazon registri, ĝuste antaŭ la domo de d-ro David JORDAN. Li piede kondukis nin laŭ la marbordo, en La Jolla, ĉar la aŭton oni devis lasi tie, pro amaso da homoj en la urbocentro.

La piroteknikaĵoj estis treege belaj, kaj daŭris pli-malpli 30 minutojn.

D-ro Jordan afable prizorgis pri poŝlampoj por ĉiuj ni, por la malluma laŭmarborda reveno. Li ankaŭ afable regaligis nin per biero, pufmaizo kaj bongustaj maizflokoj, dum ni atendadis la disigon de la densa trafiko, tuj post la piroteknikaĵoj.

Estis tre interesa programo, kaj por tiom kaj tiam, dankon al nia majstro d-ro Lazaro Ludoviko ZAMENHOF. ★



La NASK-anoj grupfotigas ĉe la kampuso de UCSD en junio. Aparecida estas tria de la dekstra flanko.



## Traduki nacilingvajn nomojn estas eterna defio

Por la ĉi-monata defio, ni elektis tekston el la romano *Slaughterhouse-Five* verkita de Kurt VONNEGUT. La romano havas trajtojn de sciencfikcio, kaj niaj tradukintoj aliris la problemojn de tiu ĝenro diversmaniere. Ni dankas al TD, SN, JP, RW, and GB pro iliaj tradukprovoj. Ĉiuj tradukprovoj estis sufiĉe similaj, krom kelkaj detaloj. Tiu unueco verŝajne devenas de la lingvaĵo de la romano. Vonnegut verkas plej ofte rekte kaj klare. La lingvaĵo en la cititaj alineoj ne estas poezio, kaj tradukisto ne devas fari strangajn tordadojn por elturniĝi.

Ni volas atentigi ke en la provoj troviĝis tro da eraroj pri la n-finaĵo, kaj en pluraj estis diversaj aliaj gramatikaj problemoj. Nu, erari estas home, kaj ĉiu el ni eraras, sed ni konsilas ke en tia kvazaŭ “konkurso” oni zorge provlegu la tekston antaŭ ol ĝin sendi. Cetere, pri la n-finaĵo, konsciigi ke ĝi funkcias laŭ reguloj, kaj oni ne uzu ĝin kie regulo ne indikas. Foje ŝajnas ke homoj simple ĵetas manplendon da n-oj sur la paĝon, kun la espero ke ili falu en la ĝustajn lokojn. Sed Esperanto, kvankam ne tute logika, tute ne uziĝas nur per hazardo.

En la romano, rolas la loĝantoj de fora planedo. En la angla, la estaĵoj de tiu planedo estas *Tralfamadorians*, kaj la planedo *Tralfamador*. Iuj tradukintoj elektis *Tralfamadoro* kiel la planedon kaj tial *tralfamadorano* kiel la loĝanton kaj *tralfamadora* kiel nomon de ilia lingvo. Aliaj tradukintoj komencis je *Tralfamadorio* kiel nomo de la planedo, do sekvas *tralfamadoriano* kaj *tralfamadoriana* lingvo. Amuze, ke mankas la *-uj* sufikso. Alia, zamenhofa aliro al la defio estas



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko ni prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ni faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi **ne** plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon **antaŭ la 1-a de novembro** al:

**[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)**

*Tralfamadorujo, tralfamadoro, kaj tralfamadora* lingvo – ĉu pli plaĉa?

La ĉefa homa rolulo nomiĝas *Billy Pilgrim*; traduki nacilingvaj nomojn estas eterna defio por tradukanto. Fojfoje oni trovas nomojn senŝanĝajn, en nacilingva ortografio. Por nomoj el lingvoj, kiuj ne uzas latinajn literojn, tiu aliro tamen ne funkcias, kaj eĉ latinliteraj nomoj ofte prezentas problemojn. Ĉar *Billy* havas duoblan *l* kaj *y*, hispanparolanto certe voĉigus la nomon malsame, ol anglaparlanto.

*Bili* konservas la elparolon de la angla sed ne sekvas la regulojn de Esperanto-vortfarado. Ĝi similas verbon, ne substantivon / nomon.

Tria aliro baziĝas sur la fakto, ke *Bill* estas karesformo de *William*, kies kutima Esperanta traduko estas *Vilhelmo*, karesforme *Vilĉjo*. (Iu proponis *Bilĉjo*, sed tio ŝajnas al ni misformo – el kiu esperanta nomo ĝi estas farita?) Sed la rezulto estas

---

nomo, kiu apenaŭ similas la originalan.  
Kiun tradukon vi uzus?

Plej sube aperas la anglalingva fontoteksto kun nia proponita traduko sinteza.

Por la venonta defio, ni proponas revenon al poezia – moderna kaj malfacila:  
*XAIPE*: 49 de E. E. CUMMINGS.

this is a rubbish of human rind  
with a photograph  
clutched in the half  
of a hand and the word  
love underlined

this is a girl who died in her mind  
with a warm thick scream  
and a keen cold groan

while the gadgets purred  
and the gangsters dined

this is a deaf dumb church and blind  
with an if in its soul  
and a hole in its life  
where the young bell tolled  
and the old vine twined

this is a dog of no known kind  
with one white eye  
and one black eye  
and the eyes of his eyes  
are as lost as you'll find

Bonan tradukadon! ★

---

## Sinteza traduko de la pasintnumera defio, ĉerpita el la romano *Slaughterhouse-Five* de Kurt VONNEGUT:

*Billy couldn't read Tralfamadorian, of course, but he could at least see how the books were laid out—in brief clumps of symbols separated by stars. Billy commented that the clumps might be telegrams.*

*"Exactly," said the voice.*

*"They are telegrams?"*

*"There are no telegrams on Tralfamadore.*

*But you're right: each clump of symbols is a brief, urgent message—describing a situation, a scene. We Tralfamadorians read them all at once, not one after the other. There isn't any particular relationship between all the messages, except that the author has chosen them carefully, so that, when seen all at once, they produce an image of life that is beautiful and surprising and deep. There is no beginning, no middle, no end, no suspense, no moral, no causes, no effects. What we love in our books are the depths of the many marvelous moments seen all at one time.*

Vilĉjo ne povis legi la tralfamadoran, kompreneble, sed li povis almenaŭ vidi kiel la libroj estis aranĝitaj – en malgrandaj grupoj de simboloj apartigitaj per steloj. Vilĉjo komentis, ke la simboloj povus esti telegramoj.

*"Ĝuste", diris la voĉo.*

*"Ĉu vere telegramoj?"*


*"Ne ekzistas telegramoj sur Tralfamaduro. Sed vi pravas, ke ĉiu grupo de simboloj estas mallonga urĝa mesaĝo, kiu priskribas situacion aŭ scenon. Ni tralfamadoroj legas ĉiujn la simbolojn samtempe, ne unu post la alia. Ne estas rilatoj inter la mesaĝoj, krom tio, ke la aŭtoro zorge elektis ilin por kune krei bildon de vivo bela kaj surpriza kaj profunda. Ekzistas nek komenco nek mezo nek fino; ne estas streĉo, moralaĵo, kialoj, rezultoj. Tio, kion ni amas en niaj libroj, estas la profundeco de multaj mirigaj momentoj viditaj samtempe.*

# Vortfarado per nekutimaj kombinoj de sufiksoj kaj gramatikaj finaĵoj

[Jen inaŭguro de nova rubriko cele al progresantoj, danke al la laboro de junulo Steĉjo CYBULSKI. En 2008 li ekkomencis studi Esperanton en baznivela kurso, kaj jam ĉi-jare li fariĝis unu el la unuaj usonanoj kiuj sukcese trapasis la prestiĝan KER-ekzamenon je nivelo C1 – la plej alta nivelo je kiu oni povas ekzameniĝi. Pro lia rapida spertiĝo kaj freŝaj memoroj de laŭvojaj lern-defioj, mi esperas ke progresantoj trovos liajn konsilojn aparte utilaj. —Red.]

Ekzistas tre multaj lerniloj por komencantoj de Esperanto, kaj ankaŭ por mezniveluloj la vojo al pli bona rego de la lingvo estas prilumata de multaj kursoj, libroj, kaj la helpo de pli spertaj esperantistoj. Tamen, por tiuj homoj kiuj jam povas esprimi sin pli malpli kontentige sed malgraŭ tio restas ekster la vicjo de la plej flujaj parolantoj, la vojo antaŭen estas malpli hela. Estas amaso da gramatikaĵoj kaj stilaj konsideroj kiuj treege gravas en kaj la parola kaj la skriba lingvo, sed kiujn oni malofte klarigas eksplicite. En tiu ĉi nova rubriko *Efike, Gramatike*, mi provos laŭ miaj kapabloj ĵeti iom da lumo al tiuj lingvaj iloj per kiuj oni povas atingi pli belan kaj esprimovan uzon de nia lingvo. Mi neniel pretendas esti aŭtoritato; ankaŭ mi estas ordinara uzanto de Esperanto kiu daŭre lernas, sed ĝuste pro tio mi opinias ke miaj spertoj kaj eltrovoj eble helpos al aliuloj. Tute ne temos ĉi tie pri teoriaj disputoj aŭ harfendado. Male, mi celas igi la rubrikon loko kie vi trovos praktikajn, tuj uzeblajn konsilojn.

En mia unua artikolo, mi volas rimarkigi al vi esplorindan rimedon de la Esperanta sistemo de vortfarado: vort-



**Steven CYBULSKI**

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

[stcybulski@gmail.com](mailto:stcybulski@gmail.com)

farado per nekutimaj kombinoj de sufiksoj kaj gramatikaj finaĵoj. Antaŭ nelonge mi rimarkis ke multaj aŭtoroj kiujn mi admiras plene ekspluatas ĉi tiun rimedon, kaj kiam mi komencis uzi ĝin mi trovis ke mi povis esprimi miajn pensojn kaj sentojn pli facile. Kvankam principe oni povas uzi ĉiun sufikson kun ĉiu gramatika finaĵo, en la praktiko ne ĉiuj kombinoj estas egale utilaj. Mi do klarigos ĉi tie nur kelkajn kombinojn kiujn mi efektive uzas, sed kompreneble vi mem povos esplori la multajn aliajn eblojn.

Unue, ni konsideru la sufikson IG. Ĉiu freŝbakita esperantisto scias ke ordinare oni faras per ĝi verbojn: el *blanka*, oni faras *blankigi*; el *boli*, *boligi*; el *manĝi*, *manĝigi*, ktp. Sed tre ofte, iu aĵo aŭ ago havas la econ, ke ĝi kaŭzas staton aŭ agon, kaj oni povas tion indiki per IG-adjektivo aŭ IG-adverbo. Ekzemple, se trafa solvo al iu problemo *kontentigas* vin, vi povas diri ke ĝi estas *kontentiga* solvo. Se iu preleganto parolas tiel malklare ke vi *misauĝas* lin, vi povas diri ke li parolas *misauĝige*. Per tiaj adjektivoj kaj adverboj, oni povas esprimi sin ege precize kaj koncize. Ankaŭ IG-substantivoj estas utilaj, kaj almenaŭ unu (kaj probable multaj aliaj) jam envenis en

daŭrigo sur paĝo 19...

# Nomoj de juvelŝtonoj en Esperanto

Kiom da nomoj de juvelŝtonoj vi scias en Esperanto? Jen instrua kvizeto kun difinoj de dek gemoj. La priskribojn sekvas indikoj pri fundamenteco (\*), oficialeco (1-a aŭ 2-a Oficiala Aldono), aŭ zamenhofeco (Z) de la nomoj. Plenigu la skatoletojn per la nomoj de la priskribitaj gemoj; legante la unuajn literojn de ĉiu nomo de supro malsupren, vi trovos avertan frazon por tiuj,

kiuj tro entuziasmas pri tiaj luksaj ŝtonoj...

Por konkursi, sendu vian solvon al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la 18-a de oktobro**. Ĉiuj membroj rajtas partopreni. Inter la solvintoj ni lotos pri \$10-rabato de la libroservo de E-USA.

Multan dankon al Russ WILLIAMS, kiu elpensis tiun ĉi enigmon!

1.

2.

3.

4.

5.

6.

7.

8.

9.

10.

1. violkolora gemo (\*)
2. ruĝa gemo (\*)
3. senkolora gemo (\*)
4. gemo kun diverskoloraj tavoloj (2)
5. ruĝa gem' (aŭ blua, kaze de Ŝerloko Holms...) (Z)
6. blanka aŭ blua gemo kun ŝanĝkoloraj rebriloj (\*)
7. blua gemo (\*)
8. verdablua gemo (\*)
9. speco de kvarco kun diverskoloraj vejnoj (1)
10. verda gemo (\*)



Estas tre bonŝance ke nia ĉi-numera gajninto estas **Russ WILLIAMS**, ĉar li ne rajtas partopreni en la nuna konkurso – pro tio, ke li mem elpensis la enigmon! Do gratulon al li, kaj laŭrojn ankaŭ al la aliaj sukcesintoj: Vilĉjo HARMON, Arlyn KERR, Georgo BAKER, Filipino kaj Elizabeto DORCAS, Nick KALIVODA, Peter MCCORQUODALE, Lucas GRAVES, William PECKENPAUGH, Dave RUTAN, E. James LIEBERMAN, Amanda SCHMIDT, Olga DU TEMPLE, Ray REDD, Cornelius MCKOWN kaj Keneĉjo GOLDBERGO.

La temo de la pasintnumera limeriko-enigmo (ankaŭ tion elpensis Russ!) estis la filmo *Slumdog Millionaire*.

## Solvo de numero 2010:4

	D	U	K		P	E	K		T	U	V	
M	I	N	O		T	R	A		E	R	A	R
R	E	G	N		M	I	T		R	I	Ĉ	A
S	T	O	K	I		K	A	T	E	N	O	J
			A	G	I		M	A	N			
K	O	N	V	I	N	K	A	S		J	U	Ĝ
T	R	I	A		T	U	R		M	U	R	O
P	A	T		M	E	K	A	N	I	K	O	J
			H	O	R		N	U	L			
M	A	R	A	R	M	E		R	I	P	A	R
U	T	E	R		I	N	A		A	R	B	O
S	A	L	E		T	U	N		R	U	I	N
	K	O	M		A	I	S		D	O	O	

**Efike, Gramatike:** daŭrigo de paĝo 17...

la ĉiutagan lingvon: UEA estas *mal-longigo* de Universala Esperanto-Asocio. Tiaj substantivoj ofte uzindas ekzemple kiam oni volas pridiskuti ian ŝanĝon: la *multekostigo* de flugoj, la *esperantigo* aŭ *elangligo* de dokumento, ktp.

Nun ni pluiru al la sufikso EC. Kutime oni faras per EC substantivojn: *grava* fariĝas *graveco*, *ruĝa* fariĝas *ruĝeco*, *mola* fariĝas *moleco*, ktp. Ankaŭ EC-adjektivoj kaj EC-adverboj estas tamen eblaj. Se la kvalitoj de io karakterizas ion alian, EC-adjektivo aŭ EC-adverbo povus esti taŭga maniero tion priskribi: ŝtofo kiu similas al *silko* estas *silkeca*, kaj iu kies rido similas al tio de *knabino* ridas *knabinece*. Oni konsciu, ke tiaj vortoj ofte estas multsignifaj: *japaneca viro* povus esti iasence tipa viro el Japanujo, dum *japaneca kanto* probable estas kanto farita alilande laŭ unu el la stiloj de japanaj kantoj. Ĉiam indas esti certa, ke via celata senco estas klara. Ofte la kunteksto povas forigi dubon.

Finfine, ni iom okupiĝu pri la sufikso IND. Per IND oni plej ofte formas adjektivojn: se oni *admiru* ion, ĝi estas *admirinda*; se oni *vizitu* iun lokon, ĝi estas *vizitinda*, ktp. Cele al rapideco dum konversacioj aŭ plaĉaj ritmoj en prozo aŭ poezio, IND-verboj kiel ekzemple *uzindas*, *farindas*, kaj *memorindas* estas utilaj; ili uzeblas en la samaj situacioj kiel IND-adjektivoj, sed ebligas la forigon de du silaboj. Oni povas uzi IND ankaŭ kiam oni volas diri ke iu ago esprimita per verbo meritas iun alian agon. Tion oni povas fari per IND-adverboj: Se iu dancas tiel bone, ke oni *spektu* tiun dancadon, ŝi dancas *spektinde*.

Kompreneble oni ne trouzu la specojn de vortoj kiujn mi priskribis ĉi tie. Se vi uzas multajn nekutimajn vortojn sen bona kialo fari tion, vi ĝenos viajn aŭskultantojn aŭ legantojn kaj estos pli malfacile komprenebla. Sed tamen, lerte uzate, ĉi tiaj vortoj ja povas doni iom da freŝeco kaj fleksebleco al via Esperanta esprimilaro. Agrablan vortfaradon! ★

# New in the E-USA bookstore

All items listed here can be ordered online at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> or by mail from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**. More complete descriptions can be found at our website. If a title is out of stock, you can have the online bookstore notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.



## MAIGRET ERARAS

**Georges SIMENON**

Tradukis el la franca Daniel Luez. La fama franca komisaró havas komplikan problemon. Tamen, kiel ĉiam, li sukcesas. Mole bindita. 126 p. 2009. Rusujo. **\$19.30**



## ELEKTITAJ POEMOJ DE BRAZILA ESPERANTA PARNASO

**Diversaj**

Red. Sylla CHAVES, Neide Barros REGO. 307 poemoj, el kiuj 118 estas verkitaĵe originale en Esperanto. Kun ampleksaj biografiaĵaj notoj kaj glosaro. Mole bindita. 189 p. 2007. Brazilo. **\$25.50**



## INFORMADO PRAKTIKE

**Ziko VAN DIJK**

Praktika manlibro por ĉiuj kiuj volas informadi pri Esperanto. La aŭtoro (denaske SIKOSEK) antaŭe skribis pri informado en la libro *Esperanto sen mitoj*. Mole bindita. 111 p. 2007. Bel-

gujo. **\$26.90**




## ARTO LABORI KUNE, LA

**D. BLANKE, U. LINS, Red.**

Panorama kolekto de diversaj artikoloj de 106 aŭtoroj omaĝe al Humphrey TONKIN, unu el la plej elstaraj esperantistoj de la lastaj jardekoj, eldonita okaze de lia 70-a

naskiĝdatreveno. Malmole bindita. 901 p. 2010. Nederlando. **\$90.50**



## LINGVO KAJ MENS0

**Noam CHOMSKY**

Tr. E. Grimley EVANS. Kolekto de eseoj okupiĝantaj pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj. Mole bindita. 188p. 2010. Nederlando.

**\$15.70**



## KAVALIROJ DE KVARDEK INSULOJ

**Sergej LUKJANENKO**

Tr. S. SMETANINA, M. ĈERTILOV. "La infanoj ne militas kontraŭ infanoj sur iu ajn planedo – ili ankoraŭ ne frenezigiĝis!" (Vladislav KRAPIVIN). Mole bindita. 221p. 2009. Rusujo. **\$31.80**



## JULES VERNE ESPERANTISTO

**Lionel DUPUY**

Kial la fama verkisto interesiĝis pri Esperanto tiom, ke li donis al ĝi ĉefan rolon en unu el siaj verkoj? Teksto en la franca kaj Esperanto. Mole bindita. 96 p. 2009. Francujo. **\$11.50**



## ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

**F. FULCHER, B. LONG**

1985 reprint of the third edition (1963). Hardcover. 332 p. Britain. **\$9.00**